11. 5. 70

Jaro V/IX. N-o 1 (49) Oktobro 1927



Monata Organo
de Sennacieca Asocio Tutmonda
FONDITA EN 1919

LITERATURO

ENHAVO:

Kastelano: Prolet', ekkonu la trompon! — *Ivan H. Krestanoff:* Tragedio de l'amo. — *Anatole France:* Almozdoni — malbonfari. Trad. Marceau. — Lasta nokto. Trad. 7338. — *D. Snejko:* Literaturo de Soveta Blankrusio. — *Louis Larreguy de Civrieux:* Per mia kulpo. Trad. Lab. Esp. Grupo, Verviers.



Redakcio: 14, Avenue de Corbéra, Paris, XII-e (Francio)
Administracio: Rich. Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germ.)

REDAKCIA ANGULO

Kiel estas dirite en la lasta n-o de "SR" kaj decidite en la VII-a Kongreso de SAT (vidu n-on 153 de "S-ulo"), de nun la revuo, gardante la saman titolon, aperos laŭ tri apartaj serioj: literatura, pedagogia, scienca.

La literatura serio estas prilaborata en Moskvo. Sed ĉar K-do Nekrasov ŝajnas esti tro okupita aŭ malsana, li ne sukcesis pretigi la oktobran kajeron. Tial, por eviti prokraston de la revuo kaj malkontentecon ĉe la abonantaro, la jena kajero estas eksterordinare prilaborita en Parizo de la Redaktoro de "S-ulo".

Eble tiu ĉi kajero ne estas tiel bona, kiel se ĝin farus nia K-do N., kiu havas apartan talenton pri tio. Sed ni esperas, ke ĝi tamen plaĉos al la legantoj kaj ke ĉi tiuj rapidos reaboni kaj instigi siajn K-dojn kaj konatojn imiti ilin.

Ĉu la kajeroj de "SR" estas prilaborataj en Moskvo aŭ Parizo, novaj brikoj ĉiam estas bezonaj — ili nur povas pligrandigi kaj plibeligi nian konstruon. Plia literaturo nur povas plifirmigi kaj diskonigi nian lingvon, nian revoluciigilon. Akvo do ĉiam estas bonvena por nia muelilo. Tiu ĉi estas en la manoj de niaj kunlaborantoj kaj abonantoj, de niaj moralaj kaj materialaj helpantoj. Ja idealo sen materialo ne taŭgas! La Redakcio de "SR" certe faros siaflanke ĉion eblan por la triumfigo de la kara afero kaj kontentigo de ĉiuj K-doj per la eldono de la promesitaj serioj, ne avarante tempon kaj penon.

Per la nova aranĝo la abonantoj de nun havas la certecon ricevi ĉiam regule la revuon. Tamen la legantoj ankaŭ ne devas resti pasivaj — ili devas helpi ĝin en materiala rilato, ĉar ili komprenas, ke la monfontoj por la ekzisto de tiu afero estas ĉerpataj precipe el la regulaj abonatoj.

Tial ni petas ĉiujn K-dojn kuri helpe al "SR", kio donos novan impulson por la disvolvo de la afero mem, kiun certe ĉiuj ne malpli ol ni ŝatas.

I. H. K.

PROLET', EKKONU LA TROMPON!

Melodio laŭ la germana popolkanto:
"Weisst du, Mutter, was ich träumt' hab'?"

Orig. esp. teksto de KASTELANO



Nun ĉiutage oni aŭdas:
"Nur la laboro savas nin!"
Sed laboron ja nur laŭdas
Ĉi — kiuj mem ne faras ĝin.
Tre stranga estas la afero
Kaj ŝajnas esti la regul'
Sur nia bela, vasta tero,
Ke nur laboras senfortul'.

Ju pli dika la sinjoro
Kaj forta estas en la mond'
Des malpli pena la laboro
Profite al tuthoma rond'.
Laboron ja pro homkompato
Ne rabas li de l' malriĉul',
Ne scias li pri ekspluato, —
"Profito nur" —. estas postul'.

Dum la milito same estis:
"Pro nia kara patroland'!"
Ĉiuj kriis, kiuj festis
La venkojn hejme ĉe la brand'
Trinkinte ili kuraĝiĝis
Kaj kantis pri heroa glor',
Sed ĉiufoje kontentiĝis,
Se ili nur ne devis for.

Dume devis la soldatoj
Restadi en terurbatal'
Kontraŭ proletaj siaj fratoj
Profite al grandkapital'.
Prolet', pripensu, ke milito
Por vi ja estas nur sufer',
Sed por ruzuloj monprofito,
Por oficiroj karier'.

TRAGEDIO DE L'AMO

La kristaneco estas altiginta ĝis kulto *la amon* ne nur kiel supera mistika kondiĉeco por kunvivado inter la homoj ("amu unu la alian"), sed ankaŭ kiel egalrajta bazo de edzeco: reciproka amo inter geedzoj. Tamen la kristaneco estas aplikita ne de la popoloj, kiu ĝin konstruis meze de la terura suferado dum la sociala dispartigo en Romo, sed de la barbaroj. Tiel eĉ la malmulto, kion la kristaneco povus apliki, estas restinta neaplikita. Jen tiel la kristana edzeco, laŭ la ortodoksa eklezio[1]), havas kiel bazon ne la egalrajtan amon, sed — "la edzo amu sian edzinon, kaj la edzino obeu al sia edzo."

Dum longaj epokoj la homa penso staris antaŭ tiu ĉina muro. Nur dum la lasta jarcento, nun — dum la kreskanta evidenteco de nova sociala dispartiĝo (la pereo de la nuntempa kapitalista societo), la meditantoj de la realeco kaj la profetoj de la estonteco levas la vualon de la kristaneca edzeco kaj malkovras la pordon por estonta edzeco *de la reala amo.*

Super ĉiuj ĉi meditantoj kaj profetoj staras pro la malproksimeco de siaj kuraĝaj klarecoj *Maurice Maeterlinck.* En du dramoj li konstruis sian revelacion: "*Monna Vanna*" kaj "*Aglavena kaj Selizeta*".

*

La amo estas supera aperigo de la homa soifo je feliĉo.

Kaj la feliĉo ne estas seksa demando.

La ĝojo de la vivo estas en la senkonscia celado al perfekteco — kiel fizika forto, kiel beleco de formoj kaj kiel kristaleco de la memkonscio.

Kaj la feliĉo estas en ĉi tiu ĝojo.

Kaj la fontoj estas en la intima mondo de la homo: *la sentoj* — gepatraj, gefilaj, gefrataj kaj komunhomaj t. e. socialaj, kiuj ĝeneraliĝas en amo inter la viro kaj la virino kiel estontaj personigantoj ĉiam de la samaj *sentoj.*

Tiel nur tiu de la homoj estas kapabla je *supera feliĉo,* ĉe kiu la fonto de la ĝojo estas plej forta t. e. ĉe kiu la sentoj (gepatraj, gefilaj, gefrataj kaj komunhomaj t. e. socialaj) estas plej neŝanceleblaj. Ĉar nur tiu atingas la superan: plenan unuiĝon inter viro kaj virino, kiel novaj daŭrigantoj de *senmorteco* t. e. kiel novaj daŭrigantoj de vivo — ĝojo, de vivo — feliĉo.

Kaj nature, kiom estas pli neperfektaj la trovitaj en la vivo formoj por intima vivo (edzeco) tiom estas pli malfeliĉa ĝuste tiu, kiu estas kapabla je supera feliĉo.

T. e. nun estas plej malfeliĉaj *la plej perfektaj homoj.*

*

Anonima venecia oraĵisto *bankrotis,* tial forkuris kun sia neplenaĝa knabo Ĝianello en Afrikon. Sed la knabo estis enamiĝinta en la neplenaĝa

---

1) Oni devas scii, ke en la ortodoksa Bulgario ekzemple validas nur la eklezia edzeco — kvazaŭ nur la pastro estas tiu, kiu cementas la bazojn de la edzeco —, la civila edzeco ne estas ankoraŭ rekonita, nek praktikata. Do en la edzecaj aferoj la eklezio staras super la Ŝtato. *Rim. de l' trad.*

knabino Ĝiovanna — filino de venecia vidvino. Ordinara historio: kiu ne havas siajn infanajn enamiĝojn? Sed por la *perfekta speco de homoj* la feliĉo sur la tero ne estas en *plur*nombro... La eta Ĝianello kreskis en Afriko, "militkaptitadis" ĉe araboj, ĉe turkoj, ĉe hispanoj (simbolo: li pasas ĉiujn etapojn de ekonomia sklaveco por la milionoj da homaj generacioj, kiuj estas senigitaj de panpeco kaj tegmento). Kaj li vivas kun sia amo al la restinta en Venecio Ĝiovanna. Kaj kiam li stariĝas je propraj piedoj en la kruelega vivo, li rapidas ŝin trovi. Sed Ĝiovanna estas jam fianĉino de Gvido — la plej forta kaj plej riĉa homo en la respubliko de Pizo...

Jen tiel la plej naturdotita homo Ĝianello t. e. la kapabla je plej supera feliĉo vidiĝas plej malfeliĉa en la vivo, nur ĉar li estas kalkulata en la milionoj, kiu plenkreskas sur la strato.

Kaj la furioziĝinta en sia malfeliĉo junulo stariĝas batale kontraŭ la "sorto": *li pasas serve al fremdaj popoloj* (simbolo: li pasas serve al la mastroj) kaj *venkas* t. e. aperigas sian *ennaskitan* superecon, akiras "gloron", leviĝas ĝis la plej supra ŝtupo meze de la homoj: fariĝas genia armeestro... Kaj en la sangaj paĝoj de la komunhoma historio aperas ankoraŭ unu kruelega nomo...

Kiom multege da homoj respektegas nun la gloron de la granda armeestro! Kaj li vivas "de unu tago al alia, esperante je nenio". Ĉar por li la blua birdo — Ĝiovanna (la beleco, la ĝojo, la feliĉo) estas forfluginta por ĉiam.

Tamen jen la kruela hazardo: iun tagon Florenco konfidas al la solulo-armeestro *tutan armeon* kaj lin sendas kontraŭ Pizo — la urbo de Gvido kaj de Ĝiovanna.

Maliceco de la sorto!

De ĉi tiu hazardo komenciĝas "la ludo" en "Monna Vanna".

Ĝianello — Princivalo estas sieĝinta Pizon, faliginta ĝiajn murojn, veniginta ĝis malsata morto ĝian 30-milan loĝantaron, kaj nun li staras antaŭ la urbo, ne eniras ĝin, ne finas ĝian sorton — li mokridas kvazaŭ la teruran tragedion de sia Ĝiovanna...

Kaj meze de la profunda konfuzo, kiun vekas ĉio ĉi kaj ĉe la venkinta Florenco kaj ĉe la venkita Pizo, — meze de tiu profunda konfuzo formuliĝas la "intrigo".

Ĝi komence estas nekomprenebla:

Princivalo estas preta perfidi Florencon!

Li transdonos al Pizo 300 veturilojn da municio kaj nutraĵo. Ankoraŭ: sennombrajn brutarojn. Kaj ankoraŭ: li mem transiros — kun siaj 100 elektitaj bravuloj — al la flanko de Pizo, por venki Florencon.

Jes, la stranga "intrigo". Kaj monstra:

— Kontraŭ ĉio ĉi Princivalo postulas nur unu aferon: aperu en lian tendon — en plena nudeco, "en sandaloj kaj mantelo" — Ĝiovanna, la reĝino de Pizo...

Ha-a, barbaro! Jes, unu el la milionoj, kiuj minacas nun la civilizacion...

Tiun teruran proponon alportas *Marko* Kolonna, patro de Gvido. Li rakontas, ke ĉe Princivalo — ĉe la barbaro! — li estas renkontinta sian estimatan majstron Marcelio Ficino, "kiu malkovris Platonon" ... kaj

parolinta kun li pri "Heziodo"[1]), "pri Aristotelo, pri Homero" ... Do en la loĝejo de la "barbaro" loĝis la plej forta kaj plej hela saĝo de sia tempo. Ĉu ne estas klare, ke tiu barbaro Princivalo ne estos el la gento de tiuj en Afriko?

La maljuna Kolonna estas tre parolema ... antaŭ ol alporti al sia filo la teruran glason de la elprovo. Li rapidas — al siaj ekstazoj de la renkonto kun la "maljuna majstro" — aldoni ankaŭ ion mirindan; — li parolas pri la "barbaro" mem, Princivalo, jene: "Mi ... pensis, ke mi renkontos barbaron, arogantan kaj malspritan, kian oni lin pentris, sensaĝan, eterne sangan kaj ebrian, kun eksplodoj de genieco, aperanta nescieble el kie sur la batalkampo ... Mi pensis, ke mi vidos en la demonon de la milito, blindan, sovaĝan, kruelan, ambician kaj insidan" ... Jen kia supozis Marko vidi la barbaron Princivalon — "kian oni lin pentris" (eble, kian oni lin pentras ankaŭ nun, kiam li estas multvizaĝa, miliona, — kvankam ankaŭ nun ĉe li estas ĉiam ĉiuj grandaj majstroj de nia tempo). Kaj li renkontis en Princivalo" ... homon, kiu riverencis antaŭ mi, kiel riverencas amanta disĉiplo antaŭ sia majstro. Li estas klerulo, elokventa, saĝulo kaj sindona al la scienco. Li scipovas aŭskulti kaj profunde sentas la belecon. Lia rideto estas plena je saĝo, li estas milda, grandanima kaj ne ŝatas la militon. Li klopodas penetri en la esencon de la aĵoj kaj en la *kaŭzoj* de la pasioj. Li scipovas rigardi en sin mem: li estas plenigita de honesteco kaj sincereco kaj servas al la insida respubliko *kontraŭ sia volo.* Porvivaj hazardoj — aŭ, eble, la sorto — lin konatigis kun la armilo kaj lin kondukis sur gloran arenon, kiun li malamas kaj volas forlasi..."

Jen, tia estas Princivalo!

Kaj malgraŭ ĉio li estas barbaro, vera barbaro, ĉar tiu homo efektive postulas — postulas insiste! — ke Ĝiovanna aperu — dum unu nokto — ĉe li — en plena nudeco.

Kaj la maljuna filozofo Marko klarigas: "Sed ... li volas plenumi unu sian deziron, kio ajn okazu... *Tiaj deziroj aperas ĉe kelkaj homoj, naskitaj kvazaŭ sub la danĝera stelo de la granda kaj nealirebla amo* (kursivo nia).

La saĝulo filozofo konjektas ne nur laŭ sento la grandan tragedion de Princivalo, kiu lin transformis el klerulo en barbaro. *Marko estas aŭdinta el la buŝo de Princivalo,* ke li amas Ĝiovanna'n, estas vidinta ŝin, konas ŝin. Sed kiam, kiel, — tio ĉi restas mistero por la mondo (Princivalo povas eĉ nur en songoj esti vidinta ŝin iam, en la infanaj mirindaj songoj; ili ja ne estas monopolo nur de la mastroj en la vivo!).

Tiel eksplodas la fajrego de la malespero en la animo de la feliĉe naskita *Gvido* — brila gvidanto, ĉasta edzo kaj amanta viro. Li estas frapita, faligita, premita en sia plej sankta sento. Kaj lia situacio estas preskaŭ senespera: lia patro jam estas raportinta al la sinjoraro kaj la konsilantaro estas alvokinta Monna-Vanna'n, por lasi al ŝi la rajton, ke ŝi mem decidu, ĉu ŝi devas sin oferi por la savo de la urbo... Do, nur unu sola espero restas al Gvido: lia luma, lia ĉasta Ĝiovanna preferu la morton antaŭ la malpurigo de sia karno (kvankam eĉ por) la savo de 30 000 homaj estaĵoj!...)

Kaj jen *la virino* forhakas la Gordian nodon de la jarcentoj; — ŝi decidas: "Mi iros hodiaŭ vespere en la tendaron de Princivalo". — Monna Vanna

1) Malnov-greka poeto — la unua proleta poeto en la homaro.

ne konas la barbaron-armeestron; ŝi ne estas vidinta lin kaj nenion aŭdinta pri li; ŝi scias nur, ke ĉi tie, en Pizo, 30 000 homaj estaĵoj — kun virinoj kaj infanoj — estas antaŭ malsata morto kaj ke ŝi povas savi ilin. Kaj je kia prezo ŝi savos ilin — ŝi ankaŭ komprenas, sentas. Kaj ŝi petas sian edzon silenti: — "silentu ... mi mortas", diras ŝi al li.

Jen tiel la iama knabeto de la bankrotinta venecia oraĵisto kaj la iama luma infano de la jam delonge mortinta venecia vidvino renkontiĝas en la tendaro de la venktriumfantaj florencaj armeoj: la unu kiel Princivalo — terura gvidanto de sangsoifa armeo, kaj la alia, kiel ĉasta Monna Vann — "reĝino" de Pizo t. e. edzino, flanko en kristana edzeco.

Kaj okazas miraklo: ili sin konas — la "barbaro" kaj la "reĝino"; — iliaj animoj sereniĝas: reviviĝas — kvankam kiel malproksima perspektivo — ilia infana amo — la iama, de la aŭroro de l'vivo, kiam la karno ne estis ankoraŭ malpurigita...

En tiuj viro kaj virino, lokitaj tiel — ĉe la du vivpolusoj! — la fonto de la feliĉo estas *nedividebla*. Ili nun iom post iom saviĝas de la maskoj de Princivalo kaj Monna Vanna kaj sin vidas denove *Ĝiovanna* kaj *Ĝianello*.

Sin malkovri kaj sin doni Princivalo kiel *Ĝianello* kaj Monna Vanna kiel *Ĝiovanna* — jen la *artplena ideo* en la dramo de Maurice Maeterlinck: la viro kaj la virino kiel *egalvaloroj*.

Forfandi la malpuran minaĵon, kia estas la hompersono en la nuna societo (societo de besta egoismo — de rabo kaj mortigoj) kaj doni ĝin pura kiel kristalo, kia ni — en nia sociala kaj spirita mizero — ĝin idealigas — jen la *revelacio,* kiun Maeterlinck kaptas en la profundaĵoj de la nuntempa homo, trairigas ĝin en ĉiu linio de sia teatraĵo kaj ĝin levas ĝis la *surfaco* de nia konscio. Princivalo kaj Monna Vanna, sukcesintaj sin purigi el la terura, nepenetrebla ŝelo, en kiu ilin katenis la nuntempa malluma kaj falsa kunvivado inter la homoj, — sukcesintaj transformiĝi denove en Ĝiovanna kaj Ĝianello, ebriiĝas de la ĝojo de l'*savo* kaj tute senkonscie forlasas malantaŭ si, malproksime post si, la alimaniere en ilia sango plenan glason kun la nektaro de l'karno (li karesas nur infane al ŝi la manojn, kaj ŝi donas al li unusolan kison — sur la frunton).

La leganto sentas nenian asketismon, nenian kristanan rezignacion. Ĝiovanna estas fremda edzino, ĉe tio ŝi amas tiun sian ("fremdan") edzon, kaj Ĝianello estas ĉe la fino de la vivovojo, — perfidulo li estas, — do ili kunvenis ne por *adulti,* sed nur por malkovri unu al la alia la senmortan briladon de siaj animoj — *sian reciprokan amon* — kaj por maldolĉe priplori la morte malĝojan neperfektecon de la kunvivado inter la homoj ĝis nun.

Tiu ĉi profundeco en la artoplena ideo de "Monna Vanna" estas venigata en la lasta akto de la teatraĵo ĝis ĝeneraligo, kiu vere povas eltiri sangajn larmojn.

Monna Vanna forkondukas Princivalon en Pizon. Li estas transdoninta al la malsatiĝinta urbo la tutan veturilaron de la florenca armeo: li savis la 30 000 pizanojn de evidenta pereo. Sekve, estas kredebleco, ke pizanoj lin akceptos kiel siulon, t. e. ne pereigos lin.

Sed Gvido ... ĉu li povos kredi tion, kio estas inter Ĝiovanna kaj Ĝianello? ... Ĉu li povos koncepti, ke Princivalo ne tuŝis lian edzinon, nur ĉar li *amas* ŝin (li amas ŝin jam de infaneco, li amas ŝin eble, antaŭ ol

li naskiĝis — kiel grandan belecon kaj perfektecon, respondantaj al la grandaj deziregoj ĉe la komunhoma esenco).

Ĝojegas Pizo. Milobla popolo rulas sin en deliro antaŭ la piedoj de Vanna, kiu — laŭ la komuna allaso — oferis sian ĉastecon (do, ĉion sian laŭ la oficialaj komprenoj!), por savi ilin. Kaj neniu alrigardas la volvitan en mantelo malhelan militiston, kiu akompanas la *madonon* en tiu terura nokto de la *elpago*.

Iras la freneziĝintaj pro ĝojo amasoj frunte kun Monna Vanna al la palaco de Gvido — ilin puŝas, kredeble, la malklara konscio, ke nur tiel povas esti elpagitaj la edzaj suferoj de ilia gvidanto t. e. ke nur tiel Gvido povus denove premi al sia brusto sian jam senigitan de "fideleco" edzinon.

Sed ili estas judasoj — tiuj amasoj: judasoj, judasoj! Ili vendis Kriston, por satigi siajn gorĝojn! Ili foriru, ho, ili foriru! Gvido frenezas; ĉe li furiozas la vejna sango de edzo, viro, amanto... Ankoraŭ ne alrigardinta sian edzinon, lia rigardo falas sur la militiston, kiu ŝin akompanas. Kiu estas tiu?! Princivalo! La malhonoriginto de lia edzino! Ho, li estos mortigita per la plej terura, plej ne verŝajna morto!

Mutiĝinta estas la ĝojeganta popolo, hirtiĝinta estas la ĉielo mem: okazos nun *miraklo* — de sankta heroaĵo aŭ de nemezurebla teruro. Kaj ĝi okazas. Sed enhavas ĝi nemezureblan teruron. Monna Vanna levas puran frunton kaj deklaras:

— Tiu ĉi homo ne *tuŝis* min. Ĉar li *amas* min.

Jen tiu ĉi pura, simpla kaj klara *vero,* ke kiu amas, tiu ne povas perforti (kaj malvirgigi), — ĝi estas la miraklo ankoraŭ meze de la nuna lupa kunvivado inter la homoj.

Kaj en "Monna Vanna" estas elemento, kiu *fortigas* la situacion: kiel povas "barbaro" ne tuŝi la virinon, kiu estis tutan nokton *nuda* en lia tendo?

La kompatinda Gvido tute furioziĝas pro tiu "moko" super li, li turnas sin al la tuta popolo kaj kriegas: — Ĉu estas almenaŭ unu inter ĉiuj vi ĉi tie kredanta, ke tiu ĉi homo ne posedis tiun ĉi virinon? Se estas tia, li venu antaŭen, li venu!

Ne, ne estas tia! Meze de la milobla popolo estas eĉ ne unu tiaulo. Nur la maljuna klerulo kaj filozofo Marko Kolonna — la patro de Gvido — nur li alpaŝas kaj deklaras laŭte: Mi kredas... Sed ĉiuj kapoj malleviĝas — hontigitaj pro la mensogo de la maljunulo... liaj vortoj por ĉiuj ĉi tie estas, ve, mensogo!

Ke la konataj al neniu suferoj de la *kaptito dum tuta vivo* Princivalo (kiuj suferoj nur kondukis lin dum momento al la forta malico, postuli Monna Vanna'n nuda) povas serenigi la *karnajn malhelaĵojn* eĉ ĉe la plej vivega viro ĝis tia grado, ke li altiĝu ĝis la alteco de pura homo, — tiun ĉi tiel simplan laŭvide veron, en la nuna malnova, en la nuna jam malviva mondo, atingas, ve, nur filozofoj, kiel Marko Kolonna!

Kaj ĉiuj aliaj, kiuj ne konas la homan esencon, ĉiuj ili, kiam ili troviĝas antaŭ barbaroj, kiel Princivalo (kiu elpostulas la fremdan virinon nuda, kaj poste falas antaŭ ŝi, ploras, konfesas siajn suferojn kaj paciĝas pura kaj bela, kiel infano), kiam ili troviĝas antaŭ tiaj "barbaroj", ili ellasas teruran, lupan blekadon: — Mortigu ilin! Batu ilin, kaj iliajn edzinojn, kaj iliajn infanojn! Ili mensogas, kiam ili parolas al vi pri amo! Kia amo ĉe barbaroj! Ne, ne, ili ne postulas nur niajn domojn kaj terojn, fabrikojn

kaj trezorojn: ili postulas niajn edzinojn kaj filinojn... Mortigu ilin, turmentu ilin: malmulto estas por ili eĉ la plej terura morto...

Ke la heroaĵo de virino, sin forŝiri de amata edzo kaj oferi sian ĉastecon, nur por savi de malsata morto 30 000 homojn, — ke tiu ĉi heroaĵo de Monna Vanna povas tiel serenigi ĉiujn kaŝitaĵojn en ŝia karno, ke ĝi levu ŝin ankaŭ ĝis la alteco de pura homo, — tiun tiel simpletan veron — jes, ankaŭ ĝin en la nuna malnova, en la nuna malviva jam mondo atingas, ve, ree nur la filozofo Marko Kolonna!

Kaj ĉiuj aliaj, kiuj konas la virinon nur en la figuro de "edzino", kaj ne ankaŭ en la figuro de homo, ĉiuj ili, kiam ili vidiĝas antaŭ tia "liberpensantino", ellasas denove lupan blekadon: — Malĉastulino ŝi estas, ne kredu al ŝi!

...Ne, tio ĉi povas eltiri, vere, ne nur sangajn larmojn el viaj okuloj, sed ankaŭ la koron el via brusto kaj la cerbon el via kranio.

Ĵetinta kun kortuŝanta forto sian revelacion, Maeterlinck tuj rompas sian tonon kaj kun kruela ironio kovras en *mortkitelo* la malvivan malnovan mondon. Monna Vanna decidas en sia animo:

— Por vi la vero estas mensogo; — bone: tiam mi en la mensogo — en via ĉieesta mensogo — enkorpigos veron.

Kaj la teatraĵo finiĝas kun la senfunda mensogo de la jarcentoj: Monna Vanna deklaras, ke verŝajne ŝi mensogis, ke Princivalo ne "havis" ŝin, sed ke ŝi trompis lin, ŝi venigis lin ĉi tien, por lin pereigi per "siaj propraj manoj".

Princivalo estas ĵetita en subteran malliberejon, kaj la ŝlosilo estas konfidita al Monna Vanna ... por ke ŝi poste forkuru kun li.

Tiel kun la eterne ripetata historio en la ĝisnuna malluma kunvivado inter la homoj — la virinaj *kaŝiteco, ruzeco, perfideco* — estas enterigata denove la granda vivdona fonto en la homo — la amo, kiu estas fonto de Kredo, de Espero kaj de komunhoma celado al perfekteco.

Kaj jen en tiu klerigo, kiun donas al ni Maurice Maeterlinck, estas kaŝita la esenco de la komuna konkludo ankaŭ ĉe Fr. Engels: "La potenco de la viro super la virino estas la fundamenta aperigo de la klasa subpremado" ("La deveno de la familio").

El la proleta literatura gazeto "Vedrina" (Sereneco) en Sofia, de Anton Straŝimirov, *trad. Ivan H. Krestanoff.*



ALMOZDONI — MALBONFARI

Estis la unua tago de la novjaro. Tra la blondaj stratoj freŝkote inter du pluvegoj, sinjoro Berĵeret kun sia filino Paŭlino iris porti bondezirojn al onklino laŭ patrina deveno, kiu ankoraŭ vivis, sed por ŝi sole kaj malmulte, kaj kiu loĝis sur Rousselet-strato en loĝeto de duonmonaĥino staranta en legomĝardeno, sub la sono de la monaĥejaj sonoriloj.

Paŭlino estis ĝoja senmotive, kaj nur ĉar ĉi tiuj festotagoj, kiuj markas tempodaŭron, plisentebligis al ŝi la ĉarmajn progresojn de ŝia juneco.

Sinjoro Berĵeret konservis, en tiu solena tago, sian kutiman indulgemon ne atendanta plu gravan bonfaron de la homoj kaj de la vivo, sed scianta, kiel sinjoro Fagon, ke estas necese pardoni multe al la naturo.

Laŭlonge de la vojoj, la almozuloj, stariĝantaj kiel kandelabroj aŭ dissterniĝantaj kiel ripozaltaroj, faris ornamon de ĉi tiu socia festo.

Ĉiuj estis venintaj ornami la burĝajn kvartalojn, niaj malriĉuloj, almozpetistoj, sentaŭgulaĉoj, kompatinduloj, malfortiguloj, favuloj kaj taŭzuloj, falsamalsanuloj kaj diboĉuloj; sed kontraŭvole suferantaj la universalan forigon de la volfortecoj, kaj konformiĝantaj je la mezkvaliteco de la moroj, ili ne dissternis, kiel en la tempo de la Coësre (Koesr: estro de la almozulaĉoj) kriplaĵojn terurajn, kaj timemigajn vundojn. Ili ne ĉirkaŭigis per sangaj tukoj, siajn membrojn stumpigitajn.

Ili estis simplaj, prezentis nur tolereblajn kriplaĵojn. Unu el ili sekvis dum sufiĉa tempo sinjoron Berĵeret lamadanta, sed tamen per facilmova paŝo, kaj li haltis kaj relokiĝis, kiel kandelabrego rande de la trotuaro.

Post tio sinjoro Berĵeret diris al sia filino:

— Mi ĵus faris malbonan agon, mi almozdonis. Donante du cendojn al Clopinel (Klopinel), mi ĝuis la hontan ĝojon malfierigi mian samulon; mi konsentis la abomenindan kontrakton, kiu certigas al fortulo lian potencon, kaj al malfortulo lian malpotencon; mi sigelis per mia sigelilo la antikvan maljustegon, mi kontribuis por ke tiu homo posedu nur duonanimon.

— Ĉu vi faris ĉion ĉi tion, patreto? demandis Paŭlino nekredema!

— Preskaŭ ĉion ĉi, respondis sinjoro Berĵeret. Mi vendis al mia frato Clopinel fratecon fals-pezile! Mi malfieriĝis, hontigante lin. Ĉar almozo malestimigas ankaŭ tiun, kiu ĝin ricevas, kaj tiun, kiu donas. Mi malbone agis.

— Mi ne kredas tion, diris Paŭlino.

— Vi ne kredas, respondis sinjoro Berĵeret, ĉar vi ne havas filozofiecon, kaj ĉar vi ne scias eltiri el ŝajne negrava ago la senlimajn konsekvencojn, kiujn ĝi portas en si mem.

Ĉi tiu Clopinel pekigis min almozece. Mi ne povis kontraŭstari pro trudeco de lia kompatiga voĉo. Mi kompatis sian maldikan kolon sen tuko, liajn genuojn, kies pantalono, etendita pro tro longa uzado, malgaje similigas al genuoj de kamelo, liajn piedojn, kies ŝuoj marŝas kun malfermitaj bekoj samkiel paro de anasoj. Deloganto! Ho danĝera Clopinel! Ĉarmega Clopinel! Pro vi, miaj cendoj produktas iom da malnobeleco, iom da honto. Pro vi, mi faris per unu cendo, iom da malbono kaj malbeleco.

Komunikante al vi ĉi tiun signaĵeton de la riĉeco kaj de la potenco, mi ironie kapitalistigis vin kaj invitis sen honoro al festeno de la socio, al festoj de la civilizacio. Kaj tuj mi sentis, ke mi estas potenculo en tiu mondo, kompare vin, riĉulo kontraŭ vi, kvieta Clopinel, rava almozpetisto, flatulo! Mi ĝojigis min, mi fieriĝis, mi kompleziĝis en mia riĉegeco kaj grandeco. Vivu, ho Clopinel! *Pulcher hymnus divitiarum pauper immortalis.*

Abomenindega kutimo de la almozdono! Antikva eraro de la burĝo, kiu donas unu cendon, kaj kiu pensas bonfari!... La universala bonfarado estas, ke ĉiu vivu de sia laboro, kaj ne de aliula laboro.

Krom la interŝanĝado kaj la solidareco ĉio estas malalta, hontinda, senfrukta!

La vera almozdonado estas la dono de la produktado de ĉiu al ĉiuj, estas la bela boneco, estas la harmonia gesto de l' animo... Ni havas nenion krom ni mem. Oni donas vere nur kiam oni donas sian laboron, sian animon, sian genion.

Laŭ Anatole France en la libro: Monsieur Bergeret (Sinjoro Berĵere).
Trad.: *Marceau (7767).*



LASTA NOKTO

Petrola lampo starigita post krado super flava fera pordo de unupersona kamero fulgis, kraketis; lampa flamo ektremadis kaj balanciĝis.

Ĵus ie, malproksime — malproksime, kvazaŭ en subtero ploris ŝajne infano. Aŭ ĝi ne estas infano, sed vento, eniĝinte sub tegmenton, bruis per defluilo, unutone fajfante per fendo de diskrakinta fenestro.

La fenestro estas malgranda sub la plafono mem, en profunda niĉo de muro. Ĝi okulkavaĵe rigardis mukan, gluan muron, malbonodoron, malsekan pajlon en angulo, necesujon, kaj malfacile enspirata aero, ŝajnis, moviĝis super la necesujo, super la lampo, super la putranta pajlo.

Afanasij Pompadulo ne dormis. Ve! ĉi-tio estis io sed ne dormo. Dum dormo tion neeblas travivi, kion travivis Afanasij. Ŝajnas: jen tuj etendadis braketojn etulino Katria. Oritaj haroj disĵetiĝis frunton kaj fermis unu bluan okuleton; blueta vesto sur brusto malbutonumiĝis, sur freŝaj vangetoj montriĝis kavetoj...

Ho! kiel ĉio ĉi tio komenciĝis, Afanasij ne povas rememori, — ektremis; sur korpo trakuris tremeto. Mano surglitis sur glua muro, dispremis blaton kaj gluan onikson; sangaj cikatroj, algluintaj al ĉemizo, streĉiĝis, krevis — sur dorso kaj maldekstra femuro ekfluis varmaj kaj gluaj sangogutoj. Ekĝemis korpo pro netolerebla doloro, dentoj dolore premis malsupran lipon kvazaŭ ili volis tramordi ĝin. Ĉu ne estas tute egale!?

Hodiaŭ — lasta nokto... Hodiaŭ lastfoje oni batis lin, elŝiradis harojn, kaj morgaŭ jam antaŭ tagiĝo mortigisto vendos ŝnuron, avide frotos manojn kaj marĉandos kiel la plej malhonesta cigano — por ĉiu detranĉita ĝia peco. Kaj por tiuj pecoj de la ŝnuro, kiuj ĉirkaŭis kolon, li petos pli altkoste.

"Ĉu Pompadulo konis kio estas komunismo? De kie?! Pompadulo multe laboris, amis edzinon, amis ĉiujn. Li diris al iu flavarughara oficiro entute malmulton: komunistoj — por malriĉuloj, kaj se ili prenos en siaj manoj la regadon, tiam la impostoj malaperos... Kaj la oficiro mem diris, ke li mem estas komunisto kaj Sofian katedralon li eksplodigis kaj ĉion eksplodigos kaj la potencon prenos komunistoj. Ankaŭ la oficiro restigis librojn pri Lenin. Ho, dio, flavharulo mem ja petis helpi al komunistoj mortigi policestron kaj ribeligi la popolon... Li, nur li...

Nun Pompadulo scias, ke la oficiro per ĉi-afero gajnis multe da mono. Nur gajigis Pompadulon tio, ke li legis Lenin'on, li scias nur,

kio estas bolŝevikoj kaj skurĝoj, turmentoj neniam povas elŝiri la sciojn.

Pri Lenin Pompadulo aŭdis, ke li estis ĉe rusoj iu profeto, granda, donis novajn librojn kaj instruis vivi tiel, ke ĉiuj estu feliĉaj. Nur unu policestro diris, ke bolŝevikoj estas rabistoj, kaj Lenin la plej furioza el ili, Lenin manĝis infanojn vivajn kaj dio por tio sendis al bolŝevikoj militon, malsaton kaj diversajn epedimiojn. Kiam Pompadulo tralegis Lenin'on li bone eksciis kion vere li devas fari; de tiu tempo ŝanĝiĝis Afanasij, ne rekonis lin lia edzino: — ĉiam silentas, kaj mantelo negaje frapis, kaj kantoj ĉesis. Aliaj pensoj venis al Pompadulo, aliaj pensoj, pro kiuj Pompadulo ekcelis en urbon. Dezirinde estis en Sofio serĉi komunistojn, helpi volis forĝi tiom da glavoj, ke ili ne manku plu. Sed malsukcesis Pompadulo. La oficiro vizitis lin du fojojn kaj ĉiam rapidis ribeligi la popolon.

Tiam Pompadulo decidis agi ... Dum malluma nokto Pompadulo per fajra parolo ekbruligis vilaĝanajn korojn, granda barako bruegis. Ĉiuj konis Pompadulon ...

Venigu nin!

Grizfonte ili eniĝis en ĝendarmejo. Policestron ili batis longe, furioze kun nekomprenebla raŭko. Kaj kun la sama raŭko per ŝnuro surkole trenis lin tra tuta placo, tra tuta strato. Matene brulis tuta urbo. Ĝendarmoj rajdis sur stratoj, batis ĉiujn, kiujn trafis sub skurĝoj. Pompadulon oni forveturigis en alian urbon. Malgranda Katria-etulina kuŝis ĉe sojlo de kabano kvazaŭ karbigita bulo, nur vidiĝis peco da blua vesteto el sub nigra kadavreto. Je ĉirkaŭbruligita saliko pendis Pompadula edzino. Ŝi ne volis fordoni edzon, alkroĉiĝadis kiel sovaĝa kato al la vizaĝo de ĝendarmo. Li per pugnofrapo faligis ŝin teren kaj Katria el la brakoj falis sur la sojlon. Tie ŝi restis ...

* * *

Malproksime en longa koridoro aŭdiĝis obtuzaj paŝoj de gardisto. Iufoje obtuze frapis flankon kolbo de pafilo, iufoje aŭdiĝis tuso de la gardisto. Poste, denove ĉio eksilentis, denove silento, kaj time estis en ĉi silento.

Pompadulo estis en malliberejo trian tagon ... sed ŝajnas, ke pasis tuta eterno: ja tutajn tri tagojn li estis batata. Hodiaŭ li havis esplor-intervidiĝon kun flavhara rusa oficiro, la oficiro kiel juĝisto demandis:

"Kie estas komunistoj, kiun vi konas el la komunistoj? ...

"Lenin'on ... lastfoje ekkriis Pompadulo ... Mortigu min, sed ne turmentu! ..."

La oficiro balancis la kapon, ridegis: "Bravulo! mi konsentas. Ho-ho-ho! Pendigu lin!"

Knaris plumo en la manoj de juĝesploristo, sed ĉe Pompadulo ruĝaj rondoj flugis antaŭ la okuloj. Vangoj pro batsignoj ŝvelis, el disbatita lipo fluetis la sango, kaj unusona penso estis: Pli baldaŭ, pli baldaŭ morti, morti...

Plu Pompadulo ne povas nun rememori en ĉi tiu malsekа, ŝtona ĉerko. Ĵus estas duafoje travivita la vivo, ĵus al li etendadis braketojn etulino Katria, ja ne eble revenigi ĉi tiun sonĝon samkiel ne estas eble revenigi vivon mem. Subite terure ekvolis li adiaŭi kun la vivo: ekvidi la koridoron, la pordon, ĉion, ĉion kaj pli multe enspiri aeron...

Deirinte de muro kaj grincante ĉenojn li aliris al kradita fenestro, apogis la kapon, liaj okuloj ekflamiĝis per nekredebla vivsoifo.

"Vivi, Vivi..." subite elŝiriĝis el la brusto, li ekbalancis la kapon, ekspazis la gorĝo, la dentoj kaptis kradon fenestran, ekaŭdiĝis ploro.

Li ektimis ombron de gardisto, ĉesis minute, poste ekspiris, okulfiksadis lampon, kvazaŭ ion rememoris. "Post kelkaj horoj oni pendigos lin, sur la placo, por timo al ĉiuj..."

Lasta ekspiro malvarme eliĝos el li kaj eniĝos en milaj brustoj, plenigos ilin per frosta timego, premos ĉe miloj da homoj ĉian forton, ĉian energion al batalo.

Ne! Nur ne tio ĉi estu.

Fiksadis okuloj la lampon... kaj ekbrulis ili pli ol la lampo mem. Ekgrincis ĉenoj, surglitis al pordo ŝupintoj. Jen la lampo, varmiĝis, brulvundis manon. Elfleksiĝis la krado, tralasis la lampon...

"Pli baldaŭ, pli rapide!..."

Deflankis brulilo, ekplaŭdis malbonodora petrolo sur ĉifonita ĉemizo, haroj, pajlo, ŝuoj, ekflamis fajro. Ekbalancis Pompadulo lastfoje la kapon, grincigis la ĉenojn, kaj freneze ekridis...

Gorĝon sufokis venena fumo, lastfoje movbrilis vizaĝeto de Katria kaj ĉio malaperis.

Ĉi tio estis en lasta nigra aprila nokto...

Tradukis 7338.



LITERATURO DE SOVETA BLANKRUSIO

Ĝis la revolucia epoko en la Blankrusia literaturo estis epoko de "vilaĝa bunto", alvokoj al nova vivo, epoko de kamparana liriko. La tiutempaj poetoj A. Garun, F. Boguŝeviĉ, Maksim Bogdanoviĉ, Janka Kupala, Jakub Kolas k. a. respegulis tre klare la vivon de vilaĝana-kamparano.

Nur Sola T. Gartnyj enportis en la poezio laboristajn motivojn. Li mem estis ledisto kaj enportis en la poezio la motivojn de sia ledista vivo.

Nur la oktobra periodo, nur la nova vivo enportis novajn motivojn en la Blankrusa poezio. La civita batalo, konstantaj okupadoj de Blankrusio ĉu per germanaj ĉu per polaj bandoj eknaskigis novajn poetojn, kiuj aktive mem partoprenis la batalon. Ili venis en la literaturo kun sia "Komjunula noto", "Nudpieduloj sur brulloko" k. a. La plej entuziasma, revoluciema poeto de tiu "terura tempo" estis juna poeto Mihas Ĉarot. Lia poemo "Nudpieduloj sur brulloko" kun grandega optimismo, kun kredo en la venko de la revolucio estis unua granda verkaĵo de la revoluciperiodo. Ne apartaj personoj estis herooj de la revolucio laŭ lia poemo, sed la "malriĉularo", — "Nudpieduloj" — kiuj mem ekleviĝis por batalo kontraŭ bienposedantoj — "panoj".

El aliaj poemoj de M. Ĉarot ni devas noti la poemojn "Marina", pri la fraŭlino-partizanino, "Korĉma" (Drinkejo) — bonegan lirikpoemon. El liaj prozverkaĵoj ni notos "Printempveno". En la revoluciepoko naskiĝis multe da novaj poetoj, kiuj fondis sian literaturgrupon "Molodnjak" (Junularo). El la poetoj de ĉi grupo ni devas noti pli bonan prozverkiston M. Zareckij kaj versaĵverkiston — A. Aleksandroviĉ, A. Dudar k. a.

Iom poste organiziĝis grupo de poetoj "Usvyŝŝa" (Supereco). Ĝi organiziĝis el K-doj, kiuj eliris el "Molodnjak". Inter la poetoj de ĉi grupo troviĝas prozverkistoj K. Ĉornyj, A. Balareka, el verŝaĵverkistoj V. Dubovka, Puŝĉa, kaj satirikverkisto Krapiva. Inter la aliaj poetoj, kiuj nun vivas kaj verkas, ni notos malnovajn poetojn Jakub Kolas, kiu jam venis kun novaj revolucimotivoj. Lia prozverko "Al vastecoj de l' vivo" envicigas lin en la unuaj vicoj de nuntempaj verkistoj-maljunuloj. Verkas Janka Kupala, T. Gartnyj. Z. Bjadula k. a. malnovaj poetoj.

"Estos ja suno ankaŭ en nia fenestro" — tiel skribis la poetoj ĝis

PER MIA KULPO

(DIROJ DE IU PATRO KONTRAŬ KAPITALISTA MILITO)

Marc Larréguy de Civrieux, naskiĝinta en Sorrente dum 1895-a jaro, estis mortigita en Verdun dum 1916-a jaro. Lia familio, lia edukiteco, liaj inklinoj estus lin fortenintaj de la revolucia movado se, subite, la milito ne estus lin pleje indigniginta. Sur la militbuĉejoj li verkis kelkajn poemojn, en kiuj li kapablis esprimi la tutan intensecon de vivo, kiu baldaŭ estos finiĝanta. En ĉi-subaj linioj lia patro esprimas siamaniere siajn konsciencriproĉojn kaj sian malamon kontraŭ la milito.

Por esprimi mian penson plej sincere, miavice, mi metas min, almenaŭ per la penso, antaŭ la morto, antaŭ cia, mia filo, okazinta, kiel antaŭ mia okazonta. Mia filo, ci estis bela kaj bona vivanto, vibranta pro amo al la vivo, entuziasmema pro arto por la vivo. Tiel ci kreskis, ankoraŭ viriĝulo kaj cin dediĉis al poezio kaj muziko. Mi edukis cin tiel bone, kiel mi povis, kiel eble plej multe en libereco, sub libera ĉielo, sub bona suno, kiel meze de la kamparo, kaj, tamen, cin instruis kaj instruigis kiel eble plej bone, ankaŭ por ciaj liberaj penso kaj volo. Antaŭ ol esti 16 jarulo, ci pasie ekentuziasmiĝis pri Lamartine, inter aliaj famaj poetoj kaj pensuloj admirataj, de ci ŝatataj. Dank'al li, ci altiĝis pli multe kaj tiom alte, ke baldaŭ mi admiris, surprizita, la esceptan altiĝon de ciaj pensoj kaj sentoj. Ci montriĝis al mi kiel elektindulo kaj — tia estis jam la harmonio de ciaj ardaj impetoj kaj saĝaj diroj — ci fariĝis mia juna Majstro... Milito eksplodis! Estas mi, mi mem, dum ia malfeliĉa tago, kiu diris al ci: "Iru kaj enskribiĝu; ci devas partopreni en ĝi — la milito!"

Ci rigardis min, miregigita. Pro monduma respekto, pro iluzio de baldaŭa finiĝo de la hombuĉado, mi insistis — eĉ je nomo de Lamartine — kaj rememorigis al ci pri lia verko "Devo kontraŭ la Patrio"!... Ci estus povinta senpene respondi al mi memore konanta

---

la revolucio. Ĝi venis! Kaj ili nun kune kun laboristoj kaj kamparanoj konstruas laboristregnon.

Ĉi lastajn 5 jarojn oni povas nomi, kiel periodo de komenco de proletari-revolucia blankrusa literaturo.

Dum 5 jaroj aperis multe da novaj literaturverkoj, aperis 4 literaturaj ĵurnaloj "Polymja", "Molodnjak", "Usvyŝŝa", "Ruĝa Semisto", kiuj unuigis ĉirkaŭ si ĉiujn poetojn.

Ĝis la revolucio eĉ ne unu ĵurnalo aperis!

Minsk. *D. Snejko.*

cian diecan majstron: "Nur egoismo kaj malamo havas patrion; frateco ĝin ne havas". Ci ne rifuziĝis ... Ci rezignaciis, pro fila kompato, akceptis memoferon altruditan de ci patro. Ses monatoj pli poste, ci devis efektive foriri por la fronto. La tago de cia foriro estis "nia neforgesebla tago", tiu, dum kiu efektiviĝis nia plena samsentiĝo. Ĉar, de monatoj, angoranta, mi estis kompreninta, sentinta. Mi volis peti pri pardono al ci, tiun tagon, pardono por esti cin lasinta kondamni al punlaboroj de la milito kaj — eble aŭ sendube — al la morto. Ci respondis al mi: "Kiel ci, paĉjo, peti pri pardono al mi" sed ci ne komprenis ankoraŭ ... kaj mi cin amas ...

Ci foriris. Ci suferis, dum 17 monatoj, plejeble. Cia fervorego estis tia, — laŭ diro de iu el ciaj malmultaj postvivantaj kunmilitintoj, kiu cin observadis kaj penadis por senpezigi al ci la spiriton kaj koron — tia, ke "neniu, sendube, suferis pli ol ci, neniu, eble, tiom"! Tamen, eĉ ne unufoje, buŝe aŭ en iu el ciaj ĉiutagaj leteroj (500 kaj pli) ci sentigis al mi cian fervoregon por ne lasi al mi nur la plej malgrandan riproĉon kontraŭ mi. Ci ne ĉesis, tute male, min subteni, min rekuraĝigi — tiom, kiom estis eble — per esprimo la plej afabla de cia fila amo kaj eĉ de cia dankemo ... Kaj tamen! mia filo, mia pasie amita filo; tiel malbone amita, estas ne nur per *Ilia* Krimo, jes *Ilia* krimo, sed per mia kulpo, la kulpo de mi — mem, ke ci devis esti iumatene, per haŭbizero, mortigita, — eble "neniigita" ... Ci, mia puranima kaj nobla infano, tiom nobla kaj puranima, ke ci antaŭe nur pene komprenis la malbonon, ci, kiun mi fieris nomi mian *majstraĵeton* — atendante la *majstraĵegon,* deveninta de mi mem, nefinitan!

Ĉu estis tromemfido? Tiuj, kiuj cin bone konis estas unuanimaj: Ci havis animon kaj naturajn proprecojn de vera artisto. Ĉu ci ne estus fariĝinta — precipe post tia malfeliĉaĵo — fama poeto kaj eble eĉ fama muzikisto (ĉar ankaŭ pri muziko ci postlasis pli ol "esperigaĵoj" ...).

Per mia kulpo, mia nerebonigebla kulpo, bedaŭrinde! jes, sed per ilia krimo, jes ilia krimo, pro ilia gloro kaj ilia profito, ci do estas senigita de la vivo, mia filo, de cia tuta vivo esperiga ... Nu, mi, la grandaĝa postvivanto, mi tie-ĉi kontraŭstaras kontraŭ ili, kontraŭ tiuj, kiuj mensogis, mensogas, vivas — triumfantaj aŭ pliriĉiĝintaj — per mensogado kaj de kiuj mi estis trompita — kiel tiom kaj tiom aliaj nekalkuleblaj getrompitoj, tiom kaj tiom aliaj nombregaj viktimoj.

Ili, ĉiuj, mia filo, kiujn cia "Sanga Muzo" malbenis. Ili, tiuj mem, kiujn iu bona kampulino iutage nomis antaŭ mi la Malbonuloj. "En ĉiuj landoj, ŝi diris, estas same: estas la Bonuloj kaj la Malbonuloj kaj estas la Malbonuloj, kiuj regas super la Bonuloj!" Kio pli simpla kaj pli vera? Sed, ĉu do ĉiam la bonuloj devas konsenti? Cia patro, mia filo, diras ne! Ĉe eklumoj de grandega fajraĵo, okazigita ĉirkaŭe

de Verdun — je noktiĝo — la tago antaŭ la ekatakado de la 15-a decembro 1916, mi cin forprenigis el la tero, kie ci kuŝis. Ci troviĝis tie envolvita en cia tenda toltuko. Tiam, mi povis cin enĉerkigi por povi cin transveturigi — poste — apud tiu, kiu estis cia dua patro: Lamartine.

Tiam, mia filo, el trans la "Nenieco", la abismo, kie jam cia fervorego, iafoje, cin senesperige ĵetis vivantan, mi cin vokis, cin, mia juna majstro, antaŭ cia morto, cin, de nun, mia juna Dio, mia Savinto, — kaj mi cin, per mia tuta fervora sufero, alvokis: "Cia animo estu kun mi! Ĝi postvivu en mi, min inspiru, havigu al mi la fortojn por cin anstataŭi — iom — por plenumi — iom — la propagandan ellaboraĵon, kiun ci estus entrepreninta per cia juneco kaj ciaj naturaj proprecoj. Cia animo estu kun mi! Ĝi entuziasmigu min, min ribeligu kontraŭ ili por savo de ĉiuj, kiuj suferas — per Ilia krimo — kaj suferus kaj mortus ankoraŭ dum Ili estas ĉiam triumfantaj.

Cia animo estu kun mi apud tiuj, kiujn mi povas konvinki kaj persvadi!

Mia kulpo, mi ĝin ne pardonas al mi. Mia sufero pliakriĝas pro konsciencriproĉoj. Mi do volas klopodi por evitigi al aliulo la saman kulpon, la samajn suferojn". Mi min turnas kun ci, mia filo, al ĉiuj, el ĉiuj landoj, gepatroj, maljunuloj kaj junuloj, kiuj legos tiujn-ĉi liniojn kaj al ili mi tiamaniere petegas: "Konsiliĝu, gepatroj, miaj gefratoj, konsiliĝu — en pleja intimeco de vi mem — kun via koro kaj via prudento, kun via tuta kaj nura saĝo natura. Ĉu vi ne komprenas, ĉu vi ne sentas, ke ne estas, por gepatroj, alia devo — ĉefa — ol tiu konservi la vivon de vi havigitan, prigardi ĝin kaj ne ĝin malŝirmi kontraŭ la morto ... Por kiu, Por kio? ...

Gepatroj, aŭskultu, per oreloj atentemaj de via konscienco, la voĉon de suferanta patro, kiu — per pento kruelege vana — al vi kriegas pri abomenego de sia kulpo, aŭskultu! vi aŭdos tion-ĉi: La forofero de la vivo por ia "Patrio" — kontraŭ ia "Alia" estas nur *oficiala devo* (Deviga Soldatiĝo), trompego, kiun ekspluatas Ambiciuloj kaj Ruzuloj, ĝenerale ŝirmitaj, Ili. Sed por savo de viaj filoj, jen estas via natura devo, tre simpla kaj tre vera, gepatroj. La "Patrio"? ... Kio do kaj precipe Kiu do? ... Koncerne min, mia filo, mi ne plu havas alian patrion ol cian; tiu, kie ci vivis spirite kaj kore kun bonaj genioj; tiu, kie, tute male al malbonfaruloj, ci pretendis — unua rajto de junulo — plenumi cian vivon ... kaj ne devi mortigi, nek esti mortigita estanta 21 jarulo!

Cia animo estu do kun mi, mia mortigita filo, ĝis mia morto kaj ĝis apud ci.

Louis Larreguy de Civrieux.

Kolektiva tradukado de gepartoprenantoj al porperfektiga kurso ĉe Laborista Esperanta Grupo. Verviers — Belgio (Junio-Julio 1926).

ATENTU!

Jen la adresoj de la tri fak-redaktoroj, al kiuj oni bonvolu sendi la koncernan materialon:

FAKO LITERATURA

K-do *Nikolao Nekrasov*, 1-a Tverskaja Jamskaja, 35, kv. 5, *Moskvo* (Sovetio)

FAKO PEDAGOGIA

K-do *Marcel Boubou*, 96, Rue St. Marceau, *Orléans*, Loiret (Francio)

FAKO SCIENC-TEKNIKA


K-do *Gregoro Demidjuk*, Degtjarnij per. 5, kv. 6, *Moskvo* 6 (Sovetio)

Tarifo de Sennacieca Revuo

(La unua nombro montras jarabonon por membroj de SAT, la dua en krampoj montras la jarabonon por nemembroj. Ni ankaŭ akceptas ¼-jaran abonon)

Argentino, pes. 2 (3); Aŭstrio, ŝil. 4 (5); Belgio, belgo 3 (4); Brazilio, milrejs. 5 (7); Britio, ŝil. 3 (4); Bulgario, lev. 100 (150); Ĉekoslovakio, kr. 20 (25); Danio, kr. 3 (4); Estonio, mk. 250 (300); Finnlando, mk. 25 (30); Francio, fr. 15 (18); Germanio, mk. 3 (4); Hispanio, pes. 4 (5); Hungario, peng. 4 (5); Italio, lir. 15 (20); Japanio, jen. 2 (2,50); Jugoslavio, din. 40 (45); Latvio, lat. 3 (4); Litovio, lid. 6 (8); Nederlando, guld. 2 (2,50); Norvegio, kr. 3 (4); Polio, zlot. 5 (7); Portugalio, esk. 12 (15); Rumanio, lej 120 (150); Sovetio, rubl. 1,50 (2); Svedio, kr. 3 (4); Svisio, fr. 4 (5); Usono, dol. 1 (1,50).

Baldaŭ aperos



E. IZGUR

NUR VOLU!

La festo de laboro kaj paco
Unuamaja kanto de ribelo

Eldono dua
Reviziita kaj ilustrita

Mendu ĉe Administracio de SAT
Richard Lerchner, Leipzig O 27
Colmstrasse 1 (Germanio)

La unua provo de sennacieca arto

estas la serio de poŝtkartoj ĵus eldonitaj. — Unu serio konsistas el kvin kartoj kaj kostas 0,50 mk. germ. Mendu tuj ĉe la ADMINISTREJO DE SAT, R. LERCHNER COLMSTRASSE 1, LEIPZIG O 27

La plej bona propagandilo por SAT

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)